

Karaj amikoj,

Je la nomo de FKEA, mi deziras al vi bonan kaj sanktan novan jaron 2013. Dum ĉi tiu jaro, kelkaj renkontiĝoj okazos tra Francujo, en kiuj partoprenos almenaŭ iuj el ni.

Trafis min malgaja novaĵo, kiu ankaŭ tuŝas la tutan Esperanto movadon. Forpasis mia patro, Francisko Simonnet en hejmbrulego en Senono. Okaze de la ceremonioj kiujn mi parte



organizis poste, oni povis diri, ke eĉ post lia morto, li sukcesis kunvenigi nin, esperantistojn aŭ katolikojn. Mi kore dankas tiujn, kiuj speciale kondolencis al mi.

Mi mem kun pluraj administrantoj de FKEA ankaŭ iris al la funebra meso la 12-an de Februaro en *Rouen* de nia frato *Albert Béssière* kiu estis prezidanto de FKEA inter 1991 kaj 2003. Ni organizos specialan ceremonion por preĝi por li.



Viktoro SIMONNET  
viktoro@uea.org

## Sinprezento de la vicprezidanto

Mes premiers cours d'Espéranto ont commencé en 1990, j'avais 25 ans, et suivaient la lecture d'un numéro du journal "la vie" dont un article d'une double page relatait les 100 ans de l'Espéranto ; ainsi que la lecture du fascicule de la collection "que sais-je?", de l'édition Presses Universitaires de France, consacré à l'Espéranto. Par la suite, j'ai adhéré à l'Union Française pour l'Espéranto (Espéranto-France), et à UEA. J'ai adhéré aussi à Lille-Espéranto, l'association locale, et à la fédération Espéranto-Nord. Lille-Espéranto a fusionné avec une plus jeune association, fondée par Michel Dechy, Villeneuve-Espéranto, et elles sont devenues Lille-Villeneuve-Espéranto. Depuis je me suis aperçu que l'Espéranto progressait par grignotages successifs, petit à petit, mais sûrement. J'ai adhéré à FKEA, et aussi au parti Europe-Démocratie-Espéranto sans pour autant être militant acharné mais en pensant qu'un parti pouvait être une structure permettant de promouvoir l'Espéranto en lui donnant une meilleure visibilité.

Mi komencis sekvi miajn unuajn esperantokursojn dum la jaro 1990 kiam mi estis 25 jara post legado de la gazeto *La Vie* en kiu dupaĝa artikolo priskribis la centjaran datrevenon de Esperanto kaj de libreto de la kolekto *Que sais-je ?* de la eldonejo *Presses Universitaires de France* pri Esperanto. Poste, mi aliĝis al la asocio Unuiĝo Franca por Esperanto kaj al UEA. Mi ankaŭ aliĝis al *Lille-Espéranto*, la loka asocio kaj al la nordfranca Esperanto federacio. *Lille-Espéranto* kuniĝis kun pli juna asocio *Villeneuve-Espéranto* fondita de *Michel Dechy* kaj fariĝis *Lille-Villeneuve-Espéranto*. Ek de tiam, mi konstatis, ke Esperanto progresas paŝo post paŝo, iom post iom, sed certe. Mi aliĝis al FKEA kaj ankaŭ al *Europe-Démocratie-Espéranto* eĉ se mi ne estas viglega militanto sed pensante, ke partio povas esti strukturo por konigi Esperanton, donante al ĝi pli bonan videblecon.



Vincent PEINGNEZ

## Bibliaj Tagoj

La Bibliaj tagoj kun Adoru okazos ĉi jare ekde la 13-a ĝis 17-a de marto 2013 en Strasburgo. Pliaj informoj haveblas en aparta folio. Ni intencas tie prezenti la filmon *Des hommes et des dieux* kun esperantigitaj subtitoloj.

## Ĝenerala kunsido

La ĝenerala kunsido de la Franca Katolika Esperanto Asocio okazos la 9-an de majo 2013, ekde la 17-a horo ĝis la 19-a kaj 15, en *Artigues* apud Bordeaux, en la kongresejo *Maison de la Promotion Sociale*.

Ekumena diservo estas planita fine de la renkontiĝo. Estas bonvenaj novaj kandidatoj kiel administrantoj.

L'assemblée générale de l'Association Catholique Française pour l'Espéranto aura lieu le 9 mai 2013 de 17h à 19h15 à Artigues près de Bordeaux dans le centre de congrès *Maison de la Promotion Sociale*.

Un office œcuménique est prévu en fin de séance.

De nouvelles candidatures au conseil d'administration sont bienvenues.

## Propono de la kasisto

La membroj, kiuj tion volas, povas ricevi nur rete la komunikaĵojn de la asocio. Tio povas ŝpari paperon, kovertojn, ktp. Por tio, bonvolu rete skribi al la prezidanto : viktoro@uea.org

# SPIRITA TESTAMENTO DE FRATO CHRISTIAN DE CHERGÉ

malfermita la Pentekostan dimanĉon 1996

## Survoje al Dio, jen kio fariĝas atentinda perspektivo...

Se okazos al mi iam – tio povus esti hodiaŭ – ke mi fariĝos viktimo de la terorismo, kiu ŝajne volas nun ampleksi ĉiujn eksterlandanojn, vivantajn en Alĝerio, mi ŝatus,

Ke mia komunumo, mia Eklezio, mia familio memoru, ke mia vivo estis oferdonita al Dio kaj al tiu ĉi lando.

Ke ili akceptu, ke la Unika Mastro de ĉiu vivo ne povos esti fremda al tiu subita foriro.

Ke ili preĝu por mi: kiel mi aperu inda je tia oferdono?

Ke ili kapablu kunligi tiun morton kun tiom da aliaj, samgrade violentaj, indiferente lasitaj al la anonimeco.

Mia vivo ne valoras pli multe ol alia, kaj ne malpli ankaŭ. Ĉiuokaze ĝi ne havas la senkulpecon de la infanaĝo.

Mi vivis sufiĉe longe por konsideri min komplico de la malbono, kiu ŝajnas, bedaŭrinde, superregi en la mondo, kaj eĉ de tiu ĉi malbono, kiu blinde frapus min.

Mi ŝatus, kiam alvenos la horo, havi tiun pecon da klarvideco, kiu permesos al mi petegi la pardonon de Dio kaj tiun de miaj homfratoj, kaj samtempe faros min kapabla doni el la tuta koro mian pardonon al tiu kiu estos min trafinta.

Nedezirinda estas por mi tia morto. Ŝajnas al mi grave, ke mi tion deklaru. Ja mi vere ne vidas, kiel mi povus ĝoji, ke tiu popolo, kiun mi amas, estos sendistinge akuzita pri mia murdo.

Tro alta estas la prezo de tio, kion oni eble nomos la «graco de martiriĝo» se tiun mi ŝuldos al Alĝeriano, kiu ajn li estu, precipe se li diros, ke li agis pro fideleco al tio kion li opiniis esti Islamo

Mi scias pri la malestimo, kiun oni direktis al la Alĝerianoj, entute prenitaj. Mi ankaŭ scias pri la karikaturoj de Islamo, kiujn subtenas certa islamismo.

Estas tro facile alpreni bonan konsciencan, identigante tiun religian vojon kun la integristoj de ties ekstremistoj.

Alĝerio kaj Islamo, por mi, estas tute alia afero: tio estas korpo kaj animo. Tion mi sufiĉe proklamis, mi opinias, per la atesto de tio kion mi ricevis de ili, trovante en ili, tiel ofte, tiun kondukan fadenon de la Evangelio, lernita sur la genuoj de mia patrino, mia unua eklezio, ĝuste en Alĝerio, kaj jam, kun respekto al la muzulmanaj kredantoj.

Mia morto, evidente, ŝajnos pravigi tiujn, kiuj rapide traktis min kiel naivulon, aŭ idealiston: «Li diru nun, kion li prie opinias!». Sed tiuj devas scii, ke estos fine liberigita mia plej obseda scivolemo.

Jen mi povos, se plaĉos al Dio, ĵeti mian rigardon al tiu de la Patro, por kontempli kun li Liajn infanojn de Islamo, tiajn, kiajn Li vidas ilin, tute iluminatajn de la gloro de Kristo, frukto de lia pasiono, supervestitajn de la dono de la spirito, kies sekreta ĝojo ĉiam estos starigita la komunecon

kaj restarigi la similecon, ludante per la diferencoj.

Pro tiu vivo perdita, totale mia, kaj totale ilia, mi dankas al Dio, kiu ŝajne estas volinta ĝin tutan por ĉi tiu ĝojo, kontraŭ kaj malgraŭ ĉio.

En tiu dankesprimado, kie ĉio estas dirita, ekde nun, pri mia vivo, mi kompreneble enkalkulas vin, amikojn de hieraŭ kaj de hodiaŭ kaj vin, ho amikoj de tie ĉi, flanke de mia patro kaj mia patrino, de miaj fratoj kaj fratinoj kaj iliaj familianoj – jen aljuĝita centoblo kiel promesite! – kaj ankaŭ vin, la amikon de la lasta minuto, kiu ne scios kion vi estos farinta.

Jes, ankaŭ por vi mi volas esprimi tiun dankon, kaj tiun «al Dio» rigardata de vi en la vizaĝon. Kaj ke estu al ni permesite renkontiĝi, latronoj feliĉaj, en paradizo, se plaĉos al Dio, nia Patro por ambaŭ. AMEN!

**Inŝa ' Allah !**

Alĝero, 1 Decembro 1993

Tibhirino, 1 Januaro 1994

Christian